

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

N-ro 17 * 29. Jan. 1921

Jurnalo internacia, universala, sendependa
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

* Eliras semajne. *

1800 infanoj en unu urbo lernas la lingvon Esperanto.

Ĉeĥoslovaka Komerc-Ministerio donas Subvencion de 10000 Kronoj al la Dektria Kongreso de Esperanto.

Laŭ komuniko de „Germana Esperantisto“ anoncis sin en Breslau (Silezio), post enkonduko de la libervola instruo de Esperanto, 1800 infanoj por lerni la internacian lingvon. En Chemnitz (Saksio) anoncis sin ĉ. 1000 infanoj.

Tiuj ĉi sukcesoj estas unikaj kaj ne atingitaj ĝis nun. La sukceson de Chemnitz atingis la fia Laborista Esp. Unuiĝo post dumonata propagando. Oni dankas tion ne nur al la aktiveco de ĝiaj anoj, sed precipe al novspeca originala plano de samideano Emil Kirchner, Chemnitz, Charlottenstr. 5, kaj al la diversspecaj propagandiloj projektitaj kaj verkitaĵe de ĉi tiu samideano kaj de la preseo Hesse & Kaufmann en Chemnitz, Königsplatz 4: afiŝoj (50x60 cm), propagandfolioj kun alvoko „Al ĉiuj gepatroj“, plus anoncoj kaj specialaj alig-formularoj kaj anig-kondiĉoj por la enskribo de la gepatroj.

La grandiozeco de la plano postulis riskon de kelkaj miloj da markoj. Sed la entrepreno sukcesis, kaj ĝia prosperado signifas, se ĝi trovos imitadon, gravan progreson en la evolucio de Esperanto, ne nur por Chemnitz, sed eble ankaŭ por Germanio kaj la ceteraj landoj. Ĉar por ĉiu infano po jare 20 markoj estas postulitaj kiel honorario, tial la enspezo multe superas la altajn kostojn por la propagando.

La nomita firmo presis la propagandilojn supre cititajn (ekz. „Alvoko al gepatroj“ kaj Aligilo“ po 10000 ekzempleroj, „Afiŝoj“ 200 ekzempleroj) kaj estas volonte preta, ilin liveri al ĉiuj aliaj Esp. unuiĝoj. Sangoj de la teksto laŭ lokaj cirkonstancoj estas enpresataj laŭ deziroj. Por ebligti kaj faciligi al la esperantistaj anaroj la saman planon, kiun oni efektivigis en Chemnitz, kaj en la intenco, per tio servi al la progresado de Esperanto, la firmo donos krediton kaj sendos al demandontoj por ilia informo unuopajn ekzemplerojn de la cititaj presaĵoj kaj promesas samtempe respondi demandojn pri la propagando-metodo.

Dehtria Universala Kongreso de Esperanto.

(31. julio ĝis 6. aŭgusto 1921 en Prago.)

Kvina Komuniko.

Teatra Prezento. — Oni ludos esperantlingven tradukitan ĉeĥan komedion „Noc na Karlštejn“ (Nokto en Kariŝtejn) de Jaroslav Vrchlický, ĉefa ĉeĥa poeto kaj verkisto.

Faka Kunveno. — Por sciencistoj; organizas d-ro Kamaryt, profesoro en Bratislava, Telocvičná 3. La intereso pri la fakaj kunvenoj sin turnu al la ĝis nun publikigitaj organizantoj!

Kotizajo. — 25 frankoj-oro (antaŭmilita valoro = 5 dolaroj, 12 nederlandaj guldenoj, 20 ŝilingoj, skandinava kronoj, germanaj markoj, 25 frankoj, liroj, dinaroj, drakmoj, pesetoj, ĉeĥoslovakaj kronoj, aŭstriaĵ kaj hungaraj kronoj, polaj kaj finnaj markoj ktp.). Pluaj samfamilianoj pagas nur 60% de la kotizajo. Post la 1. junio 1921 altiĝos la kotizajoj je 50%.

Ciu pagas en sia ŝtata valuto! La sumo sendu pere de ĉiuj ajn banko al la banko „Bohemia“ en Praha je la konto de la XIII-a Universala Kongreso de Esperanto kaj samtempe sciigu pri la aliĝo kaj mensendo la ĝeneralan sekretariojn!

Aliĝoj. — 59. s-ro Orzech, Inowrocław; 60. f-ino Boon, Haag; 61. s-ro van Doorne, 62. s-ro de Beur, 63. Hoefnagel, Rotterdam; 64. s-ro Looy, Barendrecht; 65. s-ro Leicher, Potschappel; 66. s-ro Trokop, Starok; 67. s-ro Skleněčka, 68. f-ino Dolanska, 69. s-ino Skleněčkova, 70. s-ro Fejal, 71. s-ro Tansig, 72. s-ro Faltin, 73. f-ino Marešova, 74. s-ro Inna, 75. s-ro Miltelner, 76. s-ro Charvat, 77. s-ro Cerny, 78. f-ino Kozova, 79. f-ino Kopecka, 80. s-ro Freund, Hradec Kralove; 81. s-ro Poppe, Pardubice; 82. f-ino Vesela, C. Skalice; 83. s-ino Bergrova, 84. s-ro Berger, Moravany; 85. s-ro Nosek, 86. s-ino Noskova, Dvur-Kralove; 87. s-ro Cisar, Dobruška; 88. s-ro Čermak, 89. f-ino

Rösslerova, Usti n. Orli; 90. s-ro Balíček, 91. s-ro Adamek, 92. s-ro Keyzler, 93. s-ro Netval, 94. s-ro Vlček, 95. f-ino Kulhankova, 96. s-ino Keyzlerova, Červený-Kostelec; 97. s-ro Nyvlt, Lhotaza C. K.; 98. f-ino Kučerova, Kyšperk; 99. f-ino Tyznerova; Horice; 100. s-ro Plank, Jablone n. Orli; 101. s-ro Cart, Paris.

Garantia Fundo. — Garantio almenaŭ 100 ĉeĥoslovakaj kronoj! (Vidu la trian komunikon!)
Donacoj. — Ĉeĥoslovaka komerc-ministerio 10000 kronoj, s-ro Zednik en Berlin 100 kronoj, f-inoj Marie kaj Nina Silbersteckenovy 100 kronoj, iliaj lernantinoj 30 kronoj, s-ro Harna en Holic 10 kronoj.

Deponado de la mono en Praha. — Vidu la kvaran komunikon!

Vojaĝ-Aferoj. — Vidu la kvaran komunikon!
Adreso. — Por aliĝoj kaj nur pri kongresaj aferoj: Aug. Pitlik, ĝenerala sekretario de la Loka Kongresa Komitato, Praha III, Nerudova 40. (Por la respondo aldonu respond-kuponon aŭ nacian poŝmarkojn!)

Loka Kongresa Komitato.

La Vivo.

La vivo estas: revado, sorĉa muziko, plenglena de melodio, dolĉa mistiko.

La vivo estas: rivero, bele majesta, ridante fluas ĝi pro frenezo ĝojfesta.

Le . . . tre malproksime la unuan kison de knabino amata rabas ame sentime dudekjara knabo sub fillo konata.

La vivo estas: nektaro, flora printempo, brileco, ĝemo volupta, festo de l'ento . . .

Kaj estas ĝi: reviviĝo de la estinto!
Sed ve milfoje! . . .

Mi estas viva mortinto!

Siberio, julio 1920.

Julio Baghy.

Ideo de internacia lingvo en Litovio.

Nuntempe la ideo de internacia lingvo en Litovio estas eniginta fortikajn radikojn. Se ankoraŭ Esperanto ne estas tiom disvastiĝinta, kiel ĝi povus esti, tio devenas de tiu kaŭzo, ke mankas lernolibroj kaj vortaroj. Dirante veron, la manko de lernolibroj ne ekzistas, ĉar oni povas aĉeti ilin, sed bedaŭrinde ili estas ruŝlingvaj. Sed rusan lingvon la plimulto ne uzas; eĉ ne komprenas. Nur antaŭ la mondmilito rusa lingvo estis devige lernata en ĉiuj lernejoj kaj uzata en ĉiuj institucioj. De 1915-a jaro en la lernejoj estas enkondukitaj instruata lingvo la litova, kaj tiamaniere nia juna inteligentularo ne scias sufiĉe bone fremdajn lingvojn. Pro manko aŭ verdire pro tuta malesto de esperanta-litova kaj litova-esperanta vortaro kaj ankaŭ konforma lernolibro, tiu ĉi dum militaj jaroj edukita junularo ne havas la eblecon por lerni nian internacian lingvon. Dume tiu ĉi junularo estas plej perceptema al la ideo de internacia lingvo.

Simila situacio ankaŭ troviĝas ĉe niaj najbaroj en Latvio kaj Estonio.

Pro tiaspeca fenomeno estas jam preparata esperanta-litova kaj litova-esperanta vortaroj, kiuj estos baldaŭ finitaj. Tamen starigaĵo tiu malfacilaĵo, ke oni ne havas sufiĉe da mono por eldono de tiuj ĉi necesaj libroj; tial niaj spirantoj de internacia lingvo estas devigitaj atendi kelkan tempon, ĝis ili ekvidos tiujn librojn.

Pro tiaj cirkonstancoj, malfacilaĵoj por studado de Esperanto, en nia lando iafaje aperas fervoraj kontraŭuloj de Esperanto kaj ĝenerale de arta aŭ artefarita internacia lingvo. „Dank“ al Dio, ke la nombro de tiuj kontraŭuloj ne estas granda: ĝis nun malkaŝe agadas nur unu kontraŭulo, sed tiu kontraŭulo havas influon ĉe kelkaj randoj de la loĝantaro, ĉar li estas de multaj konata verkisto-beletristo, nome — J. Jurkunas-Šeinius, kiu proponas preni por internacia lingvo „vivantan“ anglan lingvon. Laŭ lia opinio, ĉiu artefarita internacia lingvo ne povas esprimi ĉiujn nuancojn de homa penso, kaj Esperanto precipe, kiel li asertas, tute ne taŭgas por internaciaj interrilatoj, ĉar ĝi estas malriĉa je vortoj kaj ne kapablas esprimi altspiritaĵajn pensojn.

J. Jurkunas-Šeinius polemikadis kun A. Dombrasukas (Dombrovski) sur paĝoj de unu litova gazeto pri la ideo de internacia lingvo.

Okaze de tio, mi volas en tiu ĉi artikolo turni la atenton de la esperantistoj al unu demando. Ordinare multaj esperantistoj pensas, ke diversajn riproĉojn la kontraŭuloj donas plejparte por artefarita lingvo kiel ne kapabia esprimi altspiritaĵajn pensojn. Sed la historio montras, ke similaj riproĉoj ankaŭ estas iafaje direktitaj kontraŭ natura kaj vivanta lingvo. Jen ekzemplo.

De 1860 ĝis 1905 la rusa registaro estis malpermesinta presigi librojn kaj gazetojn en litova lingvo. Kiam de 1889 kelkaj agantoj de la litova movado komencis eldoni en Germanio litovajn librojn kaj ilin sekrete transsendadi en Litovion

por disvastigi ilin, tiam sur paĝoj de polaj gazetoj, eldonataj en Litovio, aperis riproĉoj kontraŭ litovaj agantoj dezirantaj renaskigi en Litovio la presitan vorton (gazetojn, librojn), ĉar litova lingvo, laŭ opinio de tiuj ŝovinistoj, ne estas kapabla esprimi ĉiujn pensojn kaj ne taŭgas por kultura vivo. Samtempe tiuj polaj publicistoj rekomendis forlasi la ekokupiĝon pri litova lingvo kaj akcepti anstataŭ ĝi la lingvon de fama poeto A. Mickievič, t. e. polan lingvon, kiu laŭ ilia opinio estas plej taŭga por esprimi altspiritaĵajn pensojn. Ankoraŭ en 1905, kiam la rusa registaro permesis presigi litovajn librojn kaj gazetojn, kelkfoje tiuj „bonfarantoj“ penadis konvinki litovojn, ke ili skribu kaj verku ĉion en pola lingvo. Sed la litovoj malakceptis tiajn proponojn.

Hodiaŭ, kiam estas renaskiĝinta nova ŝtato de Litovio, kiam en ĉiuj lernejoj oni instruas per litova lingvo, kiam profesoroj legas lekcionojn litovlingve, kiam en ĉiuj institucioj oni uzas litovan lingvon, kiam kreskas litova literaturo, — al neniu venas en la kapon la penso por aserti, ke la litova lingvo ne taŭgas por la kultura vivo.

Mi pensas, ke ankaŭ kontraŭ Esperanto oni ĉesos fari similajn atakojn, kiam la esperantistoj faros ankoraŭ unu paŝon antaŭen kaj per diversaj manieroj pli disvastigos la artefaritan internacian lingvon.

Kaunas (Litovio), 2. jan. 1921.

A. KLIMAS
redakcio „Lietuvos Ukininkas“.

25 Esp. Kursoj por Infanoj en Milano.

Dank' al la fervora subteno de la urbestro de Milano, d-ro Angelo Filipetti, oni malfermis tie 25 kursojn por geknaboj 10-12-jaraj. Geinstruistoj kaj specialaj lernolibroj estas tute pretaj.

Esperanto en Sovjet-Ruslando.

(Komplemento al la raportoj en antaŭa numero.)

El la lero de l' rusa samideano, s-ro Timoteo Ŝčavinski, sendita el Petrogrado (Rusujo) la 27-an de novembro 1920 kaj ricevita en Kovno la 21-an de januaro 1921:

... La kondiĉoj de nia vivado estas malbonegaj.

... Gis nun eliris nenia dekreto pri la deviga enkonduko de Esperanto, kiu estas instruita en kelkaj lernejoj de kelkaj urboj laŭ propra iniciato de tiuj lernejoj, t. e. same kiel antaŭ 5-10 jaroj... La diferenco estas nur, ke nun la registaro permesis al lernejoj pagi salajron al Esp. instruistoj. En Petrogrado Esperanto estas enkondukita en kelkaj tiel nomataj „Domoj de Klerigo“ (sed tute ne estas ĝi deviga). Domo de Klerigo (Dom Prosvješčenija) estas tute nova institucio, kiu entenas: 1. komunne klerigajn kursojn (gimnazio por grandaĝuloj), 2. publikan bibliotekon, kaj 3. klubon, kiu konsistas el multegaj rondetoj aŭ sekcioj: muzika, teatra, historia, literatura, ŝakluda ktp., en kelkaj eĉ Esperanta rondeto por ellerni kaj praktiki Esperanton. En unu el tiuj Domoj (N. 50-a, je nomo de Karlo Libkneht kaj Roza, Luksemburg, Kurlandskaja 18) mi mem instruas, havante kvar lecionojn semajne kaj ricevante por ĉiu leciono 121 rub.* La lernantoj estas tre nemulaj kaj vizitas lecionojn neakurate. Ĝenerale la intereso al E. estas tre malforta.

La ĝusteco kun la originalo certigas la ricevinto de la lero: P. MEDEM.

* Laŭ hodiaŭa kurzo (21. jan. 1921) en Kovno 1000 sovjetaj rubloj egalas 7 germ. markojn; do tiuj 121 rub. egalas 85 pleniĝojn. P. M.

Esperanto en Bulgario.

PLEVEN (Bulgario). Esp. Grupo havas 60 anojn. S-ro Simov gvidas kurson. Elekta komisiono preparis programon de okazontaj paroladoj, kies tasko estas konatigi sisteme kiel la anojn tiel ankaŭ la publikon kun la Esp. movado. Unua parolo s-ro Pančev pri la historio de la lingvo, dua s-ro Ivan Simeonov pri Esp. kongreso. Gazeto „Studentec“ publikigis pri-Esp. artikolojn de A. Simeonov.

SOFIA. 20 personoj en militlernejo, sub gvido de s-ro Boris Sabčev, lernas Esp. Monata organo de radikala partio „Demokratičeski pregled“ publikigis bonan pri-Esp. artikolon de S. Petkov.

KNEŬA. Komunista societo „Spartak“, kiu aranĝas kurson Esperanton, sendis al ĉiuj junulaj komunistaj centroj specialan inviton por fondo de Esp. sekcio de la Komunista Bulg. Partio. A. S.

La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Tradukis laŭ la 5-a Rusa eldono kun permeso de la aŭtoro Maria Ŝidlovskaja.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio. (15-a daŭrigo.)

Li sidigis sur sian liron, apud la amerika sinjoro, sidigis kaj eĉ disstarigis la krurojn. Mateo tamen ankoraŭ timis, ke la amerikano ofendiĝos. Sed tiam montriĝis viro simplanima kaj pacama. Ekadunte, ke oni parolas pri Tammany-Hall, afable ekridetis, kaj dum kelke da tempo li kaj Dima sidis unu kontraŭ la alia, rigardante sin reciproke.

„Good day!“¹³⁾, diris la amerikano la unua kaj frapetis Diman sur genuon.

Dima siavice frapetis lin kaj senhezite diris: „Jes.“

„Tammany-Hall!“ ree diris la amerikano, afable ridetante: „Very well!“¹⁴⁾

„Very well!“ kapijesis Dima kaj daŭrigis ruse: „He, sinjoro! Se vi volus instrui min kiamaniere vendi al tiu diablo Tammany-Hall mian voĉon, por ke oni senpage donu al mi trinki kaj manĝi?“

„Well!“ ripetis la amerikano, ridegante.

„Jes!“ ekridis ankaŭ Dima.

La irlandano ree okulsignis, frapetis Diman sur genuon, kaj ambau, videble, jam sentis sin amikoj.

VIII.

Mateo miris pri Dima, — kian talenton la homo havas! — sed li mem sidigis sur la liron, malgaje mallevis la kapon kaj enpensigis.

Jen ni estas en Ameriko, — kion do ni nun faros?

Verdire, ĉio malplaĉis al Mateo en ĉi tiu Ameriko. Ankaŭ al Dima ĉio malplaĉis, kaj li multe koleris, dum ili marŝis tra la stratoj. Sed Mateo sciis, ke Dima estas facilanima: hodiaŭ homo al li malplaĉas,

¹³⁾ Bonan tagon.

¹⁴⁾ Tre bone.

Brita Literaturo kaj Debata Societo.

La dissendita „Raporto pri Agado dum 1920“ pravas, ke la societo fervorege kaj ageme laboris dum la pasinta jaro.

La jarkunveno okazis dum la Brita Esp. Kongreso en Birmingham (tiu de 1921 okazos en Harrogate je Pentekosto), aliaj kunvenoj okazis dufoje en la monato; la komitato kunvenis dekofoje.

La nombro de la membroj estas 169. Moris bedaŭrinde s-ro J. Rhodes kaj pastro C. J. Senior. Kvar verkoj estas tradukataj, unu el ili esperable baldaŭ aperos. Kelkaj membroj partoprenis en la literaturo konkursoj 1919-1920; sed al f-ino Louise Briggs pro lerta tradukaĵo el „Twelfth Night“ apartenas la honoro ricevi la unuan oran medalon de la societo donacitan de la prez. s-ro John Merchant.

Dum 1920 estas eldonitaj „Songo de Somermeza Nokto“, la gazeto „Literaturo“ n-roj 5-8, la „Faka Vortareto pri Ombroj“ kaj „Konsiletoj al Tradukantoj“. „Literaturo“ perdis 100 malnovajn, sed gajnis 200 novajn abonantojn.

Entute: raporto pri tre vigla agado!

Komercio.

TRIESTE (Italio). Laŭ informo de „Rondo Esperanta“ (Via G. Gatter, 12) la Specimena Foiro de Trieste, post klopodoj de d-ro Koch, aranĝos specialan Esperanto-fakon.

Gazetaro.

DANZIG (Libera Ŝtato). Gazetoj estas favoraj. „Danziger Volksstimme“ (12. jan.) kaj „Danziger Allgemeine Zeitung“ (13. jan.) raportis detale pri la jarkunveno de la Danziga Esp. Asocio. La 4. febr. okazos granda internacia bazo por helpi la suferantajn infanojn de Danzig.

NEGOCE (nova titolo de l' Journal des Foires et des Expositions, organo de la Universala Komerca Muzeo (M. C. U.) en Paris, 3, rue de Chaillot. Semajna gazeto valora por ĉiu komercisto. La subtitolo estas en 5 naciaj lingvoj kaj en Esperanto.

LEIPZIGER ALLGEMEINE ZEITUNG (13. jan. 1921) enhavis bonegan artikolon de d-ro Steche „Regemo kaj Tribuno“, en kiu la aŭtoro primarktas la malakcepton de la komisiona rezolucio pri Esperanto en la Ligo de Nacioj, kaŭzitan pro la regemo de la francaj soviniŝtoj kaj la aplaŭdo de la tribuna publiko. La artikolo devus esti represata en ĉiuj germanaj kaj — iom ŝanĝigitaj — en ĉiuj jurnalaj de la mondo. Ankaŭ ĝi estus efika temo por publika parolado.

Societa Vivo.

FRANKFURT a. M. (Germ.). S-ro R. Meyer gvidas kurson en kat. junula unuigo (15 p.), k-do Messmer en sindikatejo (20 p.), s-ano Roth en Sprendlingen apud Frankfurt en lernejo (45 p.).

MILANO (Italio). 25 kursoj por geknaboj, 7 por laboristoj, 4 ĉe Esperanta Domo, 1 ĉe Milana Asocio de Oficistinoj, 1 ĉe Circolo Filologico; parolado ĉe katolikoj. La urbestro d-ro Filipetti tre favoras nian movadon; li mem estas konvinkita esperantisto.

kaj morgaŭ estas jam lia bona amiko. Ankaŭ nun, li tordas sian lipharon, elpensas vortojn kaj bonhumore rigardas al la irlandano. Dume Mateo sentis grandan malĝojon.

Jen Ameriko! Ankoraŭ hieraŭ nokte ĝi kuŝis antaŭ ili, kvazaŭ nubeto, kaj li ne sciis, kio aperos, kiam disligos la nubeto... Tamen li estis atenda inta ion mirindan, belan...

Por diri la veron, li pensis, en nia mondo la aferoj ne okazas laŭ la pensoj de homoj, kaj se homo sciis, kio okazos, eble li pasigus sian tutan vivon en Loziŝi, kun sia propra malbonsorto.

Nun la nubeto disligis, Ameriko aperis, sed la fratino malesias, kaj malesias tiu Ameriko, pri kiu li tiel multe revis super sia hejma riveto kaj sur la maro, dum la ŝipego navigis, sin balancante sur la ondoj, kaj la oceano kantis sian mallkaran kanton, kaj la nuboj en la alta ĉielo flugis, pelataj de vento jen el Ameriko Eŭropo, jen el Eŭropo Amerikon. Ankaŭ en lia animo tiam preterflugadis same mallkaraĵoj pensoj pri tio, kio fariĝas nun en la malproksima patrujo, kaj kion ili trovos trans la oceano, kie ili estos serĉantaj por si novan feliĉon...

Provu nun ĝin serĉi, tiun feliĉon, en ĉi tiea infero, kie homoj rapidas ien kiel frenezaj, sur tero kaj sub tero kaj eĉ — Dio pardonu al ili! — tra aero... kie ĉio ŝajnas tiel nesimila al nia vivo, kie oni ne facile distingas rangon de homo, kie oni ne komprenas eĉ unu sonon de homa parolado, kie strataj buboj posikuras kristanan homon, same kiel en nia lando oni eble kurus post ia turko.

„Jen kio, Dima!“ diris Mateo, sin deŝirante de siaj maldolĉaj pensoj. „Oni devas kiel eble plej baldaŭ skribi al Oŝip. Li estas ĉi tie jam kvazaŭ hejme, li donu konsilon, kiel serĉi la fratinojn, se ŝi ankoraŭ lin ne trovis, kaj ankaŭ kion ni mem nun devas entrepreni.“

„Kompreneble,“ konsentis Dima.

Ili prenis de Bork plumon kaj inkon, sidigis apud fenestro kaj komencis la leteron. Dima skribis; sed, ĉar liaj manoj ne tre ofte havas okazon teni tian malgrandan ilon, kiel plumo, li bezonis

RECIFE-PERNAMBUCO (Brazilio). Fondiĝis Pernambuka Esp. Societo kun celo kunlabori je la venko de la ideo de Zamenhof. Adreso de la ĝenerala sekretario: s-ro Th. Villa Nova, rua do Muniz 208, Recife-Pernambuco, Braz.

SIEDLEC (Polio). La 25. dec. s-ro Czesl. Pruski, del. UEA, prelegis pri Esperanto en kunveno de Instruista Unuigo de Malsuperaj Lernejoj antaŭ 25 pers. Kontentiga rezultato. Sekvis kurso, kiu gvidas s-ro Pruski, trifoje po semajno. Pro nesufiĉa nombro da energij samideanoj, la Esp. rondeto „Radio“ nur vivetas. Por ĝin plivigli, la alilandanoj estas petataj sendi al sekretario f-ino S. Wolska, str. Warszawska 66, nebezonaĵn Esperantistojn.

Recenzojo.

LIBROJ.

LA URBO DE LA BELEGA SENSENCAJO. De E. Temple Thurston, esperantigis R. Spero, Pretoria (Sud-Afriko). Eldonejo Ludwig Fries (Germ. Esp. Librejo), Leipzig, Johannisplatz 5. — Formato 13½ x 20 cm. 240 pĝ. Bone aranĝita kaj bele presita. Prezo ne montrita.

GAZETOJ.

DERARBEITER-ESPERANTIST (La Laborista Esperantisto). Jan. — Belaspekta 4-paĝa gazeto. Jar-abono 12 mk., por Germanio 10 mk. Administraj: Hannover (Germ.), Asternstr. 36. — La teksto parte en germana, parte en Esperanta lingvoj. La Esp. parto ne senpaga.

GERMANA ESPERANTISTO. Jan. Bonega propagand-numero kun diversaj tre legindaj artikoloj. „G. E.“ nun ree fariĝis unu el la plej bone redaktitaj Esp. gazetoj. La aranĝo estas bona, pres-eraroj preskaŭ tute mankas. Por la propagand-fundo de GEA estas donacitaj ĝis nun 5321,90 mk. Kun precipa gojo ni salutas la liston de la grupoj anĝintaj al GEA (nun pli ol 100).

ITALA ESPERANTISTO. Jan. El la unua numero de l' nova jaro oni vidas, ke la itala samideano ageme komencis la laborojn. En diversaj lokoj estas novaj kursoj, en kelkaj jurnalaj favoraj artikoloj. Federacio Esp. Itala havas proprajn sideojn senpage lasitan kaj ricevis monhelpon de la urbestro de Milano.

LA MARTO, oficiala organo de la Ligo de Germ. Esperanto-Societoj en Ĉeĥoslovakio. Jan. — Estas ne mirige, ke — rigarde al la nunjara Universala Kongreso en Praha — en Ĉeĥoslovakio ekaperas novaj kaj reaperas malnovaj portempe malaperintaj Esp. gazetoj. Jen demove aperas „La Marto“. Ni deziras al ĝi longan vivon kaj esperas, ke la kuraĝaj eldonantoj trovos sufiĉan subtenon. La enhavo estas interesa. Ni notis la neologismon „varo“ anstataŭ „komercaĵo“.

VERDA LITOPIO. Nov. Interesa ilustrita revueto japana, nur en Esperanto, kun reproduktaĵo de „Danco de Aŝura“ (de N. Mizuŝima), ĉefverko de la II-a Belaria Ekspozicio aranĝita de Imperia Belaria Akademio.

Internacia Esperanto-Servo.

(La traduko kaj la represo en naciaj jurnalaj kun aldono de la vortoj „Internacia Esperanto-Servo“ estas permesata.)

LETERO EL USONO.

San Francisco, januaro 1921.

Kiam mi laste skribis, mi diris ke la prezoj de ĉio malaltiĝis kaj ke multaj personoj trovis sin sen laboro pro nefunkciado de fabrikoj.

Depost tiam, speciale dum la Kristnaska periodo, la plimulto de la butikoj kaj magazenoj vendadis ĉion je multe malpli altaj prezoj ol kutime, kio montras ke la butikistoj komprenis la neceson vendi ĉion kiel eble plej rapide, ĉar ne ili, aŭ fakte neniu, povis diveni, kiaj prezoj estus akreblaj depost la festotagoj.

sufiĉe multe da tempo por skribado. Fininte la leteron, Dima komencis devuŝi ŝviton de la vizaĝo, sed subite li haltis kun larĝe malfermita buŝo. Mateo ankaŭ ekridetis posten, kaj lia koro iel agrable ektemetis.

En la ĉambro staris maljuna sinjorino en eluzita, tamen silka mantelo, en novmoda ĉapejo kun flavaj floroj kaj kun saketo en la mano. Ŝi per ŝnureto tenis blankan hundeton, kiu turniĝis ĉiuflanke, flarante la aeron.

„Nia sampatrujanino“, flustris Dima al Mateo.

Efektive, la sinjorino sidigis sur seĝon apud la pordo, malfacile spiris iom da tempo kaj diris: „Malbenita lando, malbenita urbo, malbenitaj homoj. Nu, diru do, mi petas, por kio vi ĉi tien alvenis?“

La Loziŝanoj, ĝoje aidante la gepatran lingvon, sin jetis al la sinjorino kaj preskaŭ kunfrapis la kapon, kisante ŝian manon.

Al la sinjorino, videble, ĉi tio plaĉis. Ŝi sidis sur seĝo, ne forprenante la manon, explore rigardante la sampatrujaninojn kaj kompare balancante la kapon.

„El Podol ol el Volin?“

„El Loziŝi, via sinjorino Moŝto.“

„El Loziŝi? Bonege! Kien Dio vin portas?“

„En Minnesota loĝas niaj parencoj.“

„Minnesota? Mi scias, mi scias. Marĉoj, arbaroj, muŝetoj, arbaraj bruladoj kaj verŝajne indianoj... Ha, vi, homoj, homoj! Kion do, diru, kion vi serĉas en ĉi tiu Ameriko? Pli bone estus, se vi restus en via Loziŝi!“

Eble ŝi estas tute prava, pensis Mateo. Sed Dima respondis:

„Fiŝo serĉas dronon — homo serĉas bonon.“

„Jes! Tial fiŝo kaptiĝas en reto, kaj homo en Ameriko. Tio estas tre malsaĝa. Cetere ĉi tio min tute ne koncernas. Kie do estas la mastro?“

„Mr. Bork,“ korektis la hebreo, enirante la ĉambron.

(Daŭrigota.)

En normaj tempoj oni kutime demandas pli altajn prezojn ĝuste antaŭ la Kristnaska periodo.

Depost la komenco de l' jaro multaj butikoj kaj magazenoj vendadas je ĉ. duono de la prezoj antaŭaj. Komprenble ili perdas monon, sed ili tiu-ĉi-maniere akiras kapitalon por pagi siajn ŝuldojn al la fabrikantoj, kaj nun ili povas reaĉeti kaj pleniĝi siajn bretojn je pli malaltaj prezoj. Tio ĉi certe plaĉas al la aĉetantoj, kiuj nun ekkomencas aĉeti ree, komprenante sendube ke la nunaj prezoj estas tiel malaltaj kiel ili estos dum kelka tempo.

Multaj ankaŭ devis reaĉeti, ĉar ili dum la "striktoj de aĉetantoj" preskaŭ ne aĉetis ion, ĝis kiam la prezoj malaltiĝis kiel nun.

Kiam la valoro de la dolaro tiel altiĝis kompare kun fremdaj monoj, multaj firmoj nuligis siajn mendojn. Samtempe niaj rikoltoj de ĉiuj aĵoj estis tre grandaj, kaj niaj fabrikejoj fabrikis multon; multon pli ol ni povas uzi. Sed ni trovis nin sen preskaŭ la fremda merkato. Tial ni devis konsumi ĉion mem. Prezoj falis; fabrikejoj ĉesis funkcii; multaj trovis sin sen laboro; ĉiuj ekkomencis vendi, ĉar neniu sciis, kiaj estus la daŭraj prezoj.

La bienposedanto, kiu devis pagi alte por semoj, laboro, maŝinoj, lando ktp., trovis sin kun multaj altkostaj produktaĵoj kaj malaltpreza merkato. Multaj bienposedantaj organizis sin kun celo, ne vendi, ĝis kiam ili povus vendi por pli altaj prezoj. Dumtempe prezoj pli malaltiĝis, kaj preskaŭ ĉiuj ŝuldas al la bankoj; kaj kiam kredito estis preskaŭ ne akirebla kaj ŝuldataĵoj estis pagotaj, ili devis vendi por kia ajn prezo ebla. Aliflanke multaj ne povis vendi por la prezo, kaj pro tio multaj bankoj devis fermi siajn pordojn; ĉar la bienposedantoj ne povis repagi tiu siajn ŝuldojn. La plimulto de la bankoj ne bankrotis, sed dumtempe aŭ eble daŭre devas ĉesi funkcii. Preskaŭ ĉiuj akcposedantoj kaj deponantoj ricevas la sumojn ŝuldatajn de la banko, sed neceso tempo.

En la urbo Detroit, kie estas fabrikata la plimulto de niaj aŭtomobiloj, 150 000 personoj trovas sin sen laboro, kaj pro tio aferoj en tiu ĉi urbo preskaŭ ĉesas. Sesdek mil personoj foriris de Akron (Ohio), kie niaj grandaj kaŭĉukaj fakrikejoj estas, serĉante laboron aliloke.

Mi parolis pri la malaltaj prezoj ricevataj de la bienposedantoj; sed la prezoj en la urboj daŭras esti altaj, sendube pro profitemuloj kaj ankaŭ pro la granda kvanto da altkosta manĝaĵo, kiu ne estas ĝis nun vendata de la butikistoj.

Dum la lastaj tagoj de la jaro, la prezoj de akcioj kaj obligacioj atingis novan malaltan nivelon, sed depost la nova jaro estas iom pli altaj, kaj nunaj kondiĉoj montras, ke ĉio estos pli malpli norma, kiam komencos la printempo; ĉar tiam la butikistoj kaj magazenoj estos vendintaj ĉian nun malaltprezan materialon kaj rekomencos aĉeti kaj vendi je malpli alta ol antaŭe kaj sendube daŭra nivelo. Tiam rekomencos funkcii la fabrikejoj, laboristoj ree laboros kaj siavice havos monon por elspezi. Por esti prospera, ĉiu devas havi laboron kaj monon sufiĉan por ŝpari ion, kaj la prezoj devas esti sufiĉe altaj por ke la butikistoj, la pogrاندisto, la fabrikanto, kaj la laboristo povas gajni norman profiton. A. S. VINCENT.

LETERO EL LITOVIO.

Kaunas (Kovno), 22. jan. 1921.

Litovia Seĵmo (parlamento) post 2 1/2-monata paŭzo re kolektiĝis la 17-an de januaro. Antaŭ 2 1/2 monatoj ĝi estis disiginta tial, ke tiam pola generalo Zeligovski neatendite okupis la orientan parton de Litovio kun urbo Vilnius (Vilna). Pro tiu invado de pola generalo okazis grandaj bataloj inter litova kaj pola armeoj. Disigintaj deputitoj de Seĵmo veture vizitadis multajn lokojn de la lando kaj organizadis tiel nomatajn Defendajn Komitatojn, aŭ ili mem estis eniĝintaj en aktivajn vicojn de la armeo.

Generalo Zeligovski komence nomis sin ribelanto de "Meza Litovio"; sed post kelka tempo, kiam estis tre malfacile por li kaŝi la veron, li konfesis, ke li estas veninta kun sia armeo el Polio.

Tiamtempe tiel nomata kontrola komisio de la Ligo de Nacioj enmiksitis sin en tiun ĉi aferon kaj post kelka tempo sukcesis efektiviĝi la batalhalton inter litovoj kaj poloj kaj trakonduki inter ambaŭ militiantaj flankoj "demarkacian linion". Tio okazis la 30-an de novembro 1920. Tiamaniere la bataloj ĉesis. La demando pri la okupita orienta parto de Litovio estis transdonata al la Ligo de Nacioj, kiu decidis fari plebisciton en la orienta parto de Litovio. Sed ĝis nun oni ne ankoraŭ okazigis tiun ĉi plebisciton, ĉar la Ligo de Nacioj atendas, ke litovoj kun poloj interkonsentos kaj disvolvos tiun demandon.

Tiacele delegacio de la litova registaro estis forveturinta al la pola ĉefurbo Warszawa. Tamen ĝis nuna tempo ambaŭ flankoj ne interkonsentis, kaj la interkonsilado post mallonga paŭzo rekomencos.

En Warszawa la pola registaro proponis al la litova delegitaro fari kun Polio militian konvencion, tiam Polio redonis la urbon Vilnius kaj la okupitan parton de Litovio. Sed la litova delegitaro malakceptis tian proponon.

La demando pri la orienta parto de Litovio kaj precipe la distrikto Vilnius interesas ĉiujn loĝantojn. La registaro de Zeligovski en Vilnius intencas kunvoki tiel nomatan "Seĵmon de Meza Litovio". Tamen la hebreaĵoj, litovoj kaj belorusoj (blankorusoj) jam deklaris, ke ili ne partoprenos

en la voĉdonado por Seĵmo, ĉar ili agnoskas nur Litovian registaron. Tial restas malgranda parto de loĝantoj kun pola armeo, kiuj voĉdonos.

Lastatempe ĉiuj direktis siajn rigardojn al nova okazintaĵo. Nome, por la 15-a de januaro estis aranĝita en Litovio kompleto kontraŭ la nuna registaro. Sed felice okazis nenia kunpuŝiĝo, ĉar ĝustatempe oni malkovris tiun ĉi kompletan kaj trovis ĉe konspirantoj grandan kvanton da dinamito, grenadoj kaj alia eksplodema materialo. Estas tre rimarkinda tiu fakto, ke unu parto de tiu ĉi materialo estas trovita ĉe tiaj homoj, kiuj simpatias al Zeligovski, kaj dua, pli granda parto estas trovita ĉe la simpatiantoj al rusaj bolŝevikoj (komunistoj). Fine, kune kun eksplodema materialo estas trovita granda kvanto da komunistaj proklamadoj kaj gazetoj el Moskvo ("Pravda", "Izvestija", "Bednota" k. a.). Pro tiu kompleto estas arestitaj kelkaj dekoj da suspektindaj personoj.

Ne malgranda atento ĉe la litova socio ankaŭ ekscitis la konferenco de rusoj en Parizo (t. e. anoj de dispelita per bolŝevikoj rusa konsultarato kolektiĝis en Parizo la 8-an de januaro por pritrakti la nunan situacion de kontraŭbolŝevistaj rusoj). Ĉar la kontraŭbolŝevistaj rusoj en sia Pariza konferenco deklaris, ke ili ne agnoskas la plenan sendependecon de la Baltaj Ŝtatoj, en kies nombro troviĝas Litovio, kaj volas ree enigi Litovion en la limojn de la iama imperialisista Rusio post disfalo de l' bolŝevismo. Tial ĉiuj litovaj poliitikaj partioj kaj ĝenerale la tuta loĝantaro esprimas sian indignon pro tiuj deklaroj de tiuj rusaj politikistoj. Litovoj eĉ ne pensas pri la ajn federacio kun Rusio, kaj sian sendependecon ili estas pretaj defendi per ĉiuj rimedoj, eĉ ne esceptante la armilojn. Se tio okazus, tiam eble la tri baltaj ŝtatoj Litovio, Latvio kaj Estonio batalus kune kontraŭ la rusoj por sia jam unu fojon akiritaj sendependo.

Cetere, jam nuntempe la litova gazetaro turnis sian atenton al pli forta interligo de la baltaj ŝtatoj, kies sortoj laŭ ekonomiaj kaj aliaj vidpunktoj estas similaj unu al alia.

A. KLIMAS, Kaŭnas.

Redakcio "Lietuvos Ukininkas". Laisves Aleja 60.

Lingvaj Notoj.

De Walter Lippmann.

5. ioma post ioma.

La vortoj iom, kiom, tiom ktp. estas aŭ substantivoj (iom da fromaĝo) aŭ adverboj (la afero iom progresis; tiom pli bone). Kiam oni aldonas al ili la adjektivan finaĵon -a, ili ricevas signifon similan al la ordaj numeraloj:

kioma = kiu en la nombra ordo aŭ kia laŭ la nombra ordo,

tioma = tiu en la nombra ordo aŭ tia laŭ la nombra ordo,

ioama = io en la nombra ordo aŭ ia-laŭ la nombra ordo.

Ekz. kioma horo estas? Estas la dua! — Karlo estas la dektria en sia klaso. La kioma estas via frato en sia klaso? Li estas la same tioma! — Je kioma horo mi veturu al vi? Venu je ioma! Vi ĉiam estos bonveninta!

En la esprimo "iom post iom" la vortoj "iom" estas adverboj, kaj la tuta esprimo estas adverba unuaĵo. Volante adjektiviĝi ĉi tiun, oni devas almeti la adjektivan finaĵon -a al la tuta esprimo. Do: iom-post-iom-a. La finaĵo -a fiukaze ne apartenas al la lasta "iom", sed al la tuta "iom post iom". Ekzemple oni diru: "la iom-post-iom-aj aldonoj kaj ŝanĝoj". Oni povus skribi eĉ: "la iompost-iomaj a. k. s.", sed ne bone estas: "la iomaj post iomaj a. k. s." (ET n-ro 12, pg. 2, kol. 2, al. 6), ĉar la aldonoj kaj ŝanĝoj tute ne estas iomaj (vidu supre) kaj poste ankoraŭfoje iomaj, sed ili estas karakterizataj per la tuta "iom post iom". Simile oni ne diras "la dua deka kvina tago", kiam oni volas paroli pri "la dudekkvina". Ankaŭ tie ĉi la adjektiva finaĵo apartenas al la tuto, ne al ĝiaj partoj.

6. Konsiliĝi, kompreniĝi k. s.

Sufikso, kiu ĉiam faris ion da malfacilo al la lingvo-teoriuloj, estas -iĝ-. Tamen nun, post kiam oni multe meditis kaj skribis pri ĝi, oni povas konstati kiel rezulton, ke -iĝi signifas: 1. ĝenerale: veni en staton de... (orfiĝi, fortiĝi, elreliĝi, bru(ant)igi, komenc(at)igi); 2. ĉe kelkaj verboj: esti en stato pasiva (ruliĝi, turniĝi). Tiu ĉi du signifoj tute ne konvenas al vortoj, kiaj "konsiliĝi" kaj "kompreniĝi". Ili estas kredeble formitaj senripense laŭ nacilingvaj ekzemploj: sich beraten, sich verstehen, s'entendre — postulas subjekton pluralan kaj havas la signifon: konsili unu al la alia, kompreni unu la alian.

Kiam iuj personoj (mal)amas unu la alian, oni diras ankaŭ: ili (mal)amas sin reciproke; kiam kelkaj personoj parolas unu al la alia, oni diras: ili interparolas; kiam unu konsentas kun la alia: ili interkonsentas, sed neniam oni diras en ĉi tiu senco: ili (mal)amiĝas, ili paroliĝas, ili konsentiĝas. Kaj same estas ankaŭ nebone, kvankam eble oportune kaj kutime, diri konsiliĝi kaj kompreniĝi, ĉar kiam iuj personoj "konsiliĝas", ili nek venas en la staton "konsil-", nek estas en stato pasiva, sed kontraŭe ili estas tre aktivaj. Ili ne "konsiliĝas", sed "konsilas".

Mi ne volas pretendi, ke tiuj iĝ-formoj estas tute malkorektaj kaj nepre devas esti forigataj el nia lingvo; kontraŭe mi bone konscias, ke ili estas

kvazaŭ sankciigitaj per longtempa uzateco (ne: uziĝo!), eĉ de d-ro Zamenhof. Sed ŝajnas al mi, ke ili estas logike nekonsentiĝaj kaj do ilia iompost-iom-a malapero certe ne malutilus nian lingvon. Mi do proponas por ili jenajn anstataŭaĵojn: interkonsili (analoge al interparoli k. s.), konsili unu al la alia, aŭ unu la alian, konsili al si reciproke, en specialaj kazoj ankaŭ simple konferenci; interkompreni, kompreni unu la alian, kompreni sin reciproke; oni povas eĉ forlasi la "reciproke", ĉar ne povas esti dubo pri la senco; do ankaŭ simple "sin kompreni", kaj se la komprenado estas ne nur lingva, sed ankaŭ senta, pensa, opinia, tiam oni povas kelkiukaze diri "interkonsenti" aŭ "harmonii".

El tio rezultas jenaj substantivoj: la interkonsil(ad)o, la reciproka konsilado; la interkompren(ad)o, la (reciproka) sinkomprenado; kaj en specialaj kazoj: la konferenc(ad)o; la interkonsent(ad)o.

Jen ekzemploj:

1. „La uzantoj de nacia lingva, pro-la praktikaj necesoj de konstanta interkomunikigo kaj interkomprenigo, ne povas... ŝanĝi... la lingvon...“ (ET n-ro 12, pg. 2, kol. 2, lasta alineo super la felietona streko). Ĉe nacia lingvo estas fakte necese, ke la uzantoj konstante komprenas (ne komprenigas!) unu la alian, do ke ili interkomprenas; kaj tio estas interkompreno aŭ reciproka sinkompreno, sed ne interkomprenigo! Ankaŭ la vorto „konstanta“ montras la nebonecon de la vorto „interkomprenigo“, ĉar iĝo estas unufoja ŝanĝigo de stato aŭ signifas specialkaze pasivan eston en stato, kaj ne konstantan staton aŭ agadon. El tio oni povas ekkoni, ke ankaŭ la vorto komprenigo havas sencan. Ĝi signifas, ke iu(i) iĝas komprena(n)ta(j), t. e. ke ili venas en la staton de kompreno; ekz.: Provante paroli la italan lingvon, ni ne komprenis nin (reciproke), sed ekparolinte Esperanton, ni tuj (inter)kompreniĝis kaj ankaŭ poste, kiam ajn ni interparolis per ĉi tiu lingvo, ni tre bone komprenis unu la alian.

2. La esperantisto „rajtas provi novan vorton nur per konsiliĝado kun“ la aŭtoritatuloj en nia lingvo. (ET n-ro 12, pg. 2, kol. 3, al. 4.) Kio do okazu? La esperantisto konsili al la aŭtoritatuloj (akcepti sian proponon), kaj ili konsili al li (kion ili opinias ĝusta); do: ili interkonsili al sinkonsilu reciproke aŭ intersanĝu konsilojn (opiniaĵojn), kaj tiu ĉi agado estas interkonsilado, reciproka sinkonsilado, konsil-interŝanĝo, opini-interŝanĝo, en certa speciala senco ankaŭ konferencado. (Eble li eĉ nur konsiligu la aŭtoritatulojn, petu iliajn konsilojn, konsultu ilin.)

3. „La Finnlandanoj emas al interbatiĝo“ (ET n-ro 12, pg. 4, kol. 1. La Fianĉiĝo. 4-a alineo). Ĉu vere ili batiĝas = iĝas batoj aŭ batantaj aŭ batataj? Ne, tute kontraŭe: ili ne venas senvole en la staton bat-, sed ili volas, emas bati unu la alian. Do: ili emas al interbati(ad)o!

Ĉi tiuokaze estas ankaŭ menciinda la emo de iuj esperantistoj uzi la sufikson -iĝ- anstataŭ la pasivo (kiun ja la francoj ofte esprimas refleksive, ekz. se vendre = esti vendata).

Tian ekzemplon donas jena frazo: La malsamkultimaj kaj malsamtradiciaj homoj, kiuj uzas Esperanton nur intertempe (pli ĝuste: kelktempe, kelkfoje, de temp' al tempo) kaj precipe skribe, ne povas rimarki, ĉu ili estas komprenataj (tute ĝuste; kompreniĝas estus nekorekta) aŭ ne, kaj ili ne estas devigataj korekti pro nekomprenigo sian malbonan lingvajon. (ET n-ro 12, pg. 2, kol. 3, al. 1.) Ĉi tiu nekomprenigo pensigas, ke ili iĝas nekomprenataj aŭ nekomprenantaj, sed fakte ili ne iĝas, sed estas (kiel oni vidas tute ĝuste antaŭe) nekomprenataj. Do: pro nekomprenateco aŭ nekompreniteco, ne pro nekomprenigo!

7. Flartabako.

La esprimo „flari tabakon“ en la senco: per naz-enspirado suprentiri tabakon aŭ tabakosimilan pulvoron en la nazon — estas fiksitaj de d-ro Zamenhof, bone komprenbla, kaj ankaŭ la ĝaja samideano G. Ajul, kiu riproĉas ĝin (ET n-ro 12, pg. 4, kol. 1. La Fianĉiĝo, 5-a alineo), evidente ne scias taŭgan anstataŭaĵon. Se ni donas al la vorto „flari“ krom la signifoj „senti la odoron de io“ la duan signifon „enspiri per la nazo por senti la odoron de io“, kiu havas ankaŭ la konc. vortojn en naciaj lingvoj, tiam ankaŭ la esprimo „flari tabakon“ estas logike defendebla.

8. „Ĝis“ kiel konjunkcio.

Same kiel al samideano G. Ajul (ET n-ro 12, pg. 4, kol. 1. La Fianĉiĝo, 3-a alineo) ankaŭ al mi ne plaĉas la uzo de „ĝis“ kiel konjunkcio. Tamen la uzado de prepozicioj kiel konjunkcioj estas tiom ofta en Esperanto, ke oni povas apenaŭ diri, ke estas „malĝustaj“ diri „ĝis mi revidos“. Tute analoge niaj plej bonaj aŭtoroj, inkluzive d-ro Zamenhof, diras ekz. „dum mi manĝis“ kaj ne „dum kiam“ aŭ „dum ke mi manĝis“. Aliaj prepozicioj uzataj ankaŭ kiel konjunkcioj estas: anstataŭ, antaŭ, krom kaj por.

Anoncoj en ET

kostas po kvadrac-centimetro 1 gmk., 0,10 hfl., 0,20 flk., 0,20 n. kr., 2 pencoj, 2 hung. kr., 1 ĉ. kr., 3 pol. mk., ktp. Rabato ĝis 40% ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj; krome speciala rabato de 20% por niaj abonantoj.

ANONCETOJ kostas: 2-foja enpresos: 3 gmk., 1/2 hfl., 1 flk., 1 ŝil., 6 hung. kr., 3 ĉ. kr., 10 pol. mk. ktp. 5-foja enpresos kostas la duoblon.

Abonojn al ET

oni bonvolu pagi per resp.-kup. (15 por 10 n-roj) aŭ prefere per ŝtataj bankbiletoj. Ni liveros por 20 gmk. 12 n-rojn de ET. Por 10 ŝil., 10 sv. fk., 10 pesetoj, 10 nordaj kronoj aŭ 5 ĥfl. 50 n-rojn, por 10 fr. fk. aŭ 1 dolaro 25 n-rojn, por 10 italaj liroj 15 n-rojn, por 10 finnaj mk. 10 n-rojn. — Tiuj ĉi prezoj valoras por ĉiuj landoj kun valuto pli alta ol la germana. Al Germanio, la Balkano aŭ la Baltikaj landoj ni liveros 10 n-rojn por 10 gmk., al Ĉeĥoslovakio 15 n-rojn por 20 Kĉ. Specialajn prezojn por Aŭstrio, Hungario, Polio kaj Estonio oni demandu ĉe niaj respektivaj reprezentantoj.

Niaj Abonejoj.

AŬSTRIO.

Esp.-Societo por Stirio, Graz, Schönaugasse 6.

ĈEĤOSLOVAKIO.

Otto Sklenčka, Hradec Kralové.

Prof. J. Süßner, Saaz 687.

ESTONIO.

Helmi Drezen, sekretario de Est. Esp. Unuiĝo „Espero“, Riiüiti t. 6, Tallinn.

GERMANIO.

Postscheckkonto Köln 70865, Teo Jung, Horrem Bez. Köln.

HUNGARIO.

Paŭlo Balkanyi, Budapest, Hajos-utca 15, II, 2.

POLIO.

Adolfo Oberrotman, Warszawa, Krak. Przedm. 10.

PORTUGALIO.

Agencia Esperantista, Silva & Carreira, Rua da Assunção 42, 5.

HINAJ SILKŜTOFOJ

Mi sendas per poŝpakajoj ĉiuspacajn hinajn silk-ŝtofojn kontraŭ respond-kuponoj. Tre bone por vestaĵoj de eŭropaj infanoj kaj virinoj.

Sendu unu respond-kuponon por beŭaj specimenoj ktp.

Esperanto korespondata.

C. S. Gee, Hai-Yen (via Shanghai), Hinujo.

MAŜINOJN

por agrikulturo, elektro-teknikajn artikolojn, kolorigilojn, ludajojn ktp. liveras al ĉiuj landoj

Rudolf Meyer, Frankfurt a. M. - West

(Germ.), Rödelheimer Landstr. 24.

Ĉiuspacaj poŝtkarto,

Leter-Paperoj

kopiaj paperoj kaj inksorbiloj estas malkare aĉeteblaj ĉe

Jozefo Major * Budapest IX, Remete str. 36-II-4.

Mi vendas prefere grandkvante. Al inform-petoj aldonu respond-elspezon.

Aleksandro Laquer (Sandor), industria artisto (ostoskulptisto), eksnotario, internacia komisiisto, ĉefsekretario de Hung. Esp. Soc., Budapest, Kiraly str. 57-II-2, akceptias

Reprezentadon

en Hungario de ĉiuj ajn ŝtatoj, fabrikistoj, grand-komercoj; komisiotojn privatajn, oficialajn, komercajn; nature nur korespondante Esperant-lingve. Sendas ne uzitajn hung. poŝtmarkojn (tutaj serioj) por katalog-prezo aŭ por altaj valorajoj.

Nun bezonas eburon (elefanti-osto).

Filatelistoj!

Ĉiuspacajn hungarajn poŝtmarkojn vendas, ankaŭ grandkvante kaj po folio. Proponojn kun prezo al

Akos Borsodi, Budapest VI,
Révay utca 24. — (Hung.)

Ĉiuj produktoj por ĉiuj landoj

H. Bidaux

Esperantista Fırno.

Speciala Fako en:

NUTRAJ PRODUKTAĴOJ — LIKVIROJ

— VAKSKANDELOJ —

ŜNUROJ — ŜNURETOJ — PARFUMARO

— FABRIKITAĴ PRODUKTAĴOJ. —

S-ro H. Bidaux, Paris 12-e

5 - Place d'Aligre.

Filatelistoj, atentu!

Varsovio, Polio, Krak-Przedm. 10
Adolfo Oberrotman

povas liveri al seriozaj propagandaj filatelistoj kolekton da diversspecaj poŝtmarkoj, ĝis 50 serioj diversaj: Ukrainaj, rusaj jubileaj Romanoff, rusaj sovjetaj, kaj ĵus aperintaj en Litovio de generalo Zeligowski. Ankaŭ malnovaj moneroj. La pago per bankbiletoj, respond-kuponoj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj.

4^a Internacia Foiro de Frankfurt a. M.

Printempa foiro: 10.—16. aprilo 1921.

Ampleksa ekspozicio de 50 branĉoj.

Programo:

Importo kaj Eksporto.

Akcelado kaj rekonstruado de la internacia interŝanĝo de komercaĵoj. Prospektoj en germana, angla, franca, itala, hispana, dana, norvega, holanda, sveda lingvoj kaj en Esperanto.

Korespondado en Esperanto!

Antaŭ-Katalogo kun plurlingva registro, Listo de la Komercaj Branĉoj en Esperanto.

Oni petu tuj presajojn aŭ detalajn informojn de

Messamt (Esperanto-fako) Frankfurt a. M. (Germ.).

Eksportado

Japana

Importado

Esperanta Komerca Korporacio

Jokohama, Jamasiraco 80

日本エスペラント貿易商會

輸出輸入商

横濱市山下町七十番

Korespondado ekskluzive en Esperanto.

Telegrafa Adreso: Esperanto Jokohama.

Telegrafaj Kodoj: ABC Eldono 5-a, Bentley, Lieber, Western Union kaj Privata.

Reprezentanto: R. Kreuz, Frankfurt a. M. (Germ.), Schneckenhofstr. 15.

Anoncetoj.

ŜANĜO DE ADRESO. S-ro Ksaw. Alfus (Krakow, Pedzichow 22) sciigas ĉiujn interesulojn pri ŝanĝo de sia adreso; ĝi estas: Ksaw. Alfus, Wied-Bank Zwiazk., Tarnov (Polujo). La ŝanĝo koncernas ankaŭ korespondadon kun „E.E.A.S.“

HUNGARA LITERATURO. Pro malaltiginta valuto hungara tre malkaraj Esp. libroj el hungara literaturo. Petu proponojn de Hungara Esp. Servo, Paŭlo Balkanyi, Hajos-utca 15-II-2, Budapest VI.

GLUMARKOJ de Postkongreso en Budapest 1921, poŝtkarferio havebla ĉe Hungara Esp. Servo. Petu proponojn de Paŭlo Balkanyi, Budapest VI, Hajos-utca 15-II-2.

DEZIRAS KORESPONDI AŬ INTERŜANĜI:

S-ro J. T. Holmes, Roundwood Grange, Baildon, Shipley (Anglujo) deziras gekorespondantojn el ia lando por siaj ĝeneralantoj 12 ĝis 55 jaraĵ. Li mem nepras respondos la unuajn poŝtkartojn.

Kiu sendas al mi 50 poŝtmarkojn de sia lando, ricevos ankaŭ 50 poŝtmarkojn de Germanio. Mi tuj respondas. Walter Dick, Plauen i. V. (Germ.), Forststrasse 84.

A. Kurassov, Riesenkampstr. n-ro 29-1-5, Tallinn (Reval), Estonio, interŝanĝas poŝtmarkojn.

Karlo Paszy, Budapest VII, Erzsebet körut 54, per poŝtkarto il. poŝtmarkoj.

Emilo Klammert, Budapest VIII, Prater-u. 46-I-8, per poŝtkartoj, pk. il. poŝtmarkoj, sigelmorkoj, gazetoj kaj leteroj. Antal Haber (lernanto), Budapest IX, Ernő-u. 12/19, per poŝtk. il.

Kolomano Toth, Budapest IX, Gyep-u. 11-1-19, per poŝtkartoj il. kaj poŝtmarkoj.

Johano Tomau (lernanto), Budapest IX, Gar-utca 25-1/8, per poŝtkartoj il. kaj leteroj, precipe pri matematiko kaj sociologio.

S-ano Carl Kueper, Düsseldorf 5 (Germanio), Graf Adolf-Sir. 11, deziras korespondadi kun ĉiuj landoj, precipe kun Usono, Japanio kaj Ĉinio, por interŝanĝi poŝtkartojn, Esperantaĵojn kaj memoraĵojn; ĉiam respondos.

Emeriko Strasser, Budapest IX, Remete u. 36-II-8, deziras korespondi per poŝtkartoj il., leteroj, poŝtkartoj, gazetoj nacilingvaj kaj Esperantaj, ŝlosiloj. Tuj respondos.

Dezirantoj korespondadi, interesuloj pri Siberio, pri Rusio, pri regado de Kolĉak kaj aliaj ĝeneraloj, povas komenci interkorespondadon kun s-ro B. Najdin, Kuzeĉkaja 65, Omsk, Siberio.

S-ro Michaelo Zsamboky, Kispeszt, Bercsenyi u. 55, Hung., korespondas kun socialistoj el ĉiuj landoj.

Varsovio, Polio, str. Ziota 51, s-ro Konstanty Chmielewski, deziras interŝanĝi kun diversaj esperantistoj tutmondaj. Kiu sendos al mi diversajn poŝtmarkojn militajn, ricevos de mi rekompence diversajn neuzitajn kartojn ilustritajn.